

decembro 1969

62-a jaro

n-ro 769 (12)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



"La kresko de internacia
kunlaboro kaŭzis tutmondan
mankon de kvalifikitaj
interpretistoj kaj tradukistoj.
Necesas trovi ekvilibron inter
la principo de la egaleco de
la lingvoj kaj la realaj bezonoj
de administrado en internaciaj
medioj."

— Sir Alexander MacFarquhar,
Direktoro de la Oficistaro
de Unuiĝintaj Nacioj

KRIZO DE LA KONFERENCOJ

Vi trovos

en nia lasta numero de 1969 kuraĝigajn raportojn pri sukcesoj atingitaj (p. 182-185) kaj samtempe instigajn pensojn pri rimedoj por rapidigi la progreson (p. 181). La kampanjo "Esperanto programita" (p. 184) ne estas la unua ekzemplo de la fakto, ke unu sola persona iniciato povas signifi vere grandan paŝon por la movado. Kiel, se en dekoj da landoj tra la mondo troviĝus homoj, kiuj per la samaj modestaj rimedoj atingus la samajn brilajn rezultojn? Ĉu eble vi mem?

Enhavo

- 181 Ok rimedoj por certa progreso (Nikolov)
- 182 Post litovaj, nun estonaj lernejoj akceptas Esperanton
- 182 Nova vigla merkato por Esperanta literaturo
- 182 "Usono grave postrestas" en esploroj pri la lingva problemoj
- 183 Marionetoj kaj ministerioj
- 184 Esperanto programita; Modernaj homoj parolas Esperanton
- 186 Recenzoj
- 186 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 187 Bibliografia servo?
- 188 Loke - Fake - Persone (mallongaj novaĵoj)
- 189 55a Universala Kongreso, Vieno, 1970
- 189 Geografia malordo? (leteroj)
- 189 Informejo (Vi demandas - ni respondas)
- 190 TEJO-Paĝo
- 191 En "Esperanto" antaŭ 50 jaroj
- 191 Nekrologo Marin
- 191 Esperanto en radio
- 191 Oficiala informilo n-ro 429
- 192 Anoncetoj

La kovrilo

prezentas scenojn el la Tutmonda Kongreso de Eklezioj, okazinta en Uppsala, Svedujo. Sed ĝi precize similas, en unu rilato, al internacia kongreso de ateistoj, anesteziistoj aŭ meblo-fabrikantoj: la aŭskultiloj por samtempa interpretado fariĝis kvazaŭ universala emblemo de la lingva kaoso, de la konflikto inter, unuflanke, la moderna sopiro al internacia kunlaboro kaj, aliflanke, la absurde antikva lingva konfuzo. Ju pli da internaciaj konferencoj, des pli kriza la situacio fariĝas. Ju pli da oficialaj lingvoj, des pli da kostoj. Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konsila komitato deklaris: "... necesas kompreni, ke ju pli kosta fariĝas la produktado de la dokumentaro, des malpli Unuiĝintaj Nacioj povas dediĉi siajn limigitajn rimedojn al la gravega kampo de evolu-helpo." Kaj pri konferencoj: jam en 1968 U Thant esprimis maltrankvilon, ke baldaŭ ne plu eblos havigi sufiĉajn kaj sufiĉe kapablajn interpretistojn kaj tradukistojn al ĉiuj konferencoj anoncitaj.

(Informoj: UN-dokumentoj A/6872, A/6991/Rev.2, A/C.5/SR.1200. Fotoj: Europa Press)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstere. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Brit.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, Str. KRN 1 m 41, Warszawa 1, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

Ok rimedoj por certa progreso

Unu el la plej sukcese kaj konsciencie laborantaj landaj asocioj de UEA estas sendube la bulgara. En ĉi tiu artikolo la gvidanto de la tre aktiva komisiono por turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio listigas kelkajn el la ĉefaj punktoj, kiuj laŭ lia sperto decidas pri la progreso aŭ malprogreso de unuopaj landaj kaj lokaj organizaĵoj. Kune ili formas bonan bazon por grupa diskuto kaj planado.

Kelkaj esperantistoj — precipe en okcidenteŭropaj landoj — parolas kaj skribas pri stagnado aŭ maljuniĝo de nia movado. Aŭskultante ilin kaj legante similspecajn materialojn en la esperanto-gazetaro, mi pensas, ke plej ofte oni konstatas la malsanon kaj diagnozas ĝin, sed malofte montras kuracilon, kiu povas helpi la malsanulon.

Al tiuj nesufiĉe fortikaj esperanto-organizaĵoj ni devas montri la irendan vojon, por ke la movado ne lamu kaj plenumu siajn taskojn kaj celojn. Jen kelkaj konsiloj, kiujn mi proponas:

1. Elekti kompetentajn personojn

En la estraroj de la organizaĵoj oni devas elekti personojn, kiuj deziras kaj kapablas labori. Ofte la elekto de la plej eminentaj kaj aŭtoritataj esperantistoj mem estas la ĉefa kaŭzo de la malaktivado. Ordinare tiaj personoj opinias, ke oni elektas ilin ne por labori, sed pro iliaj meritoj.

La estraro de kiu ajn organizaĵo devas gvidi, entuziasmigi la anaron. Ĝi devas esti avangardo de la movado. Kiam oni devas elekti personojn por estraro, nepre necesas kontroli iliajn kapablojn, i.a. organizajn, kaj emon aktive labori. Por tio eblas ekzemple doni taskojn al la proponotoj por la estraro kelkajn monatojn antaŭ la elektoj.

2. Propraj ejoj

La luado aŭ aĉetado de propraj ejoj por la organizaĵo kaj nepre en konvena loko estas grava kondiĉo por sukcesaj organizado, laborado, kaj informado.

3. Havi salajratajn oficistojn

Iom post iom ĉiuj landaj, distriktaj kaj urbaj esperanto-organizaĵoj devas havi salajratajn oficistojn. La estraro devas altiri multe da aktivuloj, kiuj plenumadu apartajn taskojn.

4. Monrimedoj

La pagado de la kotizo estas grava organiza tasko. Ĝi estas mezurilo pri la fideleco de membroj al la internacia lingvo kaj ĝia movado. Sed la kotizoj ne estas, nek povas esti la sola fonto de monrimedoj, ĉar ili tute ne sufiĉas por vasta agado. Oni devas serĉi diversajn manierojn por havigi monon al la movado: peti subvencion, donacojn, reklamojn por la esperanto-gazetaro. La esperantistaro subtenas finance iniciatojn, kiujn ĝi opinias utilaj por la movado. Tion pravas la landaj kaj mondaj kampanjoj por kolektado de mono.

5. En turisma kampo

Ĝis nun tre sporade ni turnis atenton al la turismo. Se en ĉiu lando estus oficejo aŭ servo "Esperanto-Turismo", kiu organizadus enlandajn kaj eksterlandajn ekskursojn por esperantistoj kaj amikoj de esperanto, tio multe povus kontribui por la vigligo de la movado kaj por la stabilligo de la financoj.

La urbaj esperanto-komitatoj devas kompili adresaron de la entreprenoj, kie deŝoras esperantistoj kaj povas priservi klientojn per esperanto. Ekzemplero de tiaj nomaroj estu je dispono de ĉiu veninto en la urbo, ekzemple en urbaj informoj, stacidomoj, hoteloj, poŝtejoj k.s.

6. Evitu sektecon

Rompu la izolecon. Tio estas la unua kondiĉo por vasta kaj sukcesa agado. Pli da kunvenoj, renkontoj, ekskursoj, vizitoj, en kiuj partoprenu ankaŭ neesperantistoj. Kiu diras, ke ne ni devas iri al la publiko, sed ĝi devas veni al ni, tiu agas sekte kaj izolas la movadon de ĝiaj naturaj fontoj, el kiuj ni ĉerpas novajn fortojn. Ni devas starigi kontaktojn kaj proponi al diversaj kulturaj, turistaj, filatelistaj, sportistaj k.a. organizaĵoj nian kunlaboradon por efektivigo de celoj kaj taskoj, kiuj estas utilaj por ambaŭ organizaĵoj.

7. Belartoj helpas

Oni turnu grandan atenton al la informado. Eldonadu belajn kaj bonkvalitajn informilojn. La tekstojn kaj la desegnaĵojn faru spertuloj. Malbonaj tekstoj, multe da gramatikaj kaj presaj eraroj, diletante faritaj ilustraĵoj ne donas bonajn rezultojn.

Ni devas altiri al nia movado ankaŭ tiajn personojn, kiuj povas apliki la lingvon en sia laboro kaj kiuj povas grave helpi nian movadon: artistoj, muzikistoj k.s.

8. En landaj organizaĵoj

Ĉiu landa esperanto-organizaĵo devas havi korespondan kurson kaj minimume po unu 15- ĝis 20-tagan kurson por komencantoj, progresantoj kaj instruantoj de esperanto. Se eble, la kursanoj estu invitataj partopreni Internacian esperanto-aranĝon, kiu forte entuziasmigas novulojn.

Eble ne ĉiuj ĉi sugestoj estas taŭgaj por ĉiuj landoj. Vi cerbumu kaj decidu, kion vi povas apliki por plibonigo de via esperanto-laboro.

N. Nikolov

Post litovaj, nun estonaj lernejoj akceptas Esperanton

Jam la dua balta soveta respubliko enkondukis oficalan instruadon de Esperanto en lernejoj. En la Estona S.S.R., ekde la nuna lernojaro la Ministerio de Klerigo oficiale permesas instrui Esperanton en la oka klaso po unu horo semajne, se troviĝas minimume 15 lernantoj kaj kapabla instruisto.

Temas pri tute nova decido farita jam post la Lerneja Konferenco en Helsinki. El la aliaj du baltaj respublikoj, Litovujo jam en la lernojaro 1968-69 enkondukis instruadon de Esperanto (vidu: "Esperanto", marto 1969, p. 42), dum en Latvujo aperas serioza interesiĝo pri simila paŝo (vidu: oktobro 1969, p. 164).

Jam du estonaj lernejoj profitas la oficialan permeson. En mezlernejo en Tallinn gvidas kurson por la 9a, 10a kaj 11a klasoj s-ro A. Ilves. En la Teknika Lernejo de Leĝera Industrio en Tallinn gvidas kurson por 40 knabinoj s-ro Johannes Palu. La kursfinintoj ricevos oficialan ateston.

Tiu paŝo estas plia signo de la laŭgrada plifavoriĝo de la oficiala sinteno al Esperanto en Soveta Unio.

Nova vigla merkato por Esperanta literaturo

La vigliĝo de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakujo, kie antaŭ nelonge fondiĝis du novaj Landaj Asocioj, reflektiĝas en la vigla eldona kaj libro-venda agado. La grupo en Vsetín, ekzemple, raportas, ke ĝi entreprenis la eldonon de serio da libroj. Lernolibreto eldonita en la aŭtuno de 1967, en 1 500 ekzempleroj, forvendiĝis en 7 monatoj. Dua, ampleksigita eldono en 1968 forvendiĝis en 9 monatoj. Mil kvincent ekzempleroj de vortaro ĉeĥa-Esperanta elĉerpiĝis en unu jaro. Sama kvanto de la legolibro "interesa legaĵo" (1968) finiĝis en 8 monatoj.

La grupo nun planas trian, ilustritan eldonon de la lernolibro, ĉi-foje en 3000 ekz., duan legolibron kaj volumon da kristnaskaj kantoj kun melodioj. La libroservo de la sama grupo sukcesis importi librojn en Esperanto el Polujo, Hungarujo, Soveta Unio, Vjetnamujo, Ĉinujo, Nederlando, Finnlando, Bulgarujo, Germanujo, Svisujo kaj Danujo, kaj entute vendis 6 000 librojn al 4 600 mendintoj.

„USONO GRAVE POSTRESTAS“ en esploroj pri la lingva problem

Usono, kiu havas gvidan pozicion en preskaŭ ĉiuj branĉoj de la scienco kaj tekniko, grave postrestas en unu fako: la esplorado de la lingva problem. En tiu fako ĝiaj politikaj rivaloj jam akiris utilan sperton, kaj Usono devus dediĉi multe pli grandan atenton al la solvo de la lingva problem, se ĝi volas konkuri kun ili.

Tio estas la esenca argumento de speciala raporto sub la titolo "The American Lag in Solving the Language Problem" (La usona postrestado rilate solvon de la lingva problem), kiun preparis la nova institucio "Esperantic Studies Foundation", laŭ peto de Roman C. Pucinski, membro de la Cambro de Reprezentantoj.

La raporto emfazas kvar ĉefajn punktojn: (1) En Usono preskaŭ tute ne ekzistas interlingvistikaj esploroj, sed en Soveta Unio tiu fako estas multe

studata; (2) Usono disponas multajn lingvistojn, sed nur kelke da spertuloj pri interlingvistiko; (3) La Parlamenta Biblioteko (Library of Congress) kaj aliaj usonaj bibliotekoj ne posedas la librojn kaj dokumentojn necesajn por tiaj studoj; (4) Miloj da homoj lernas internacian planlingvon "en la lernejoj kaj universitatoj de la komunista bloko", sed preskaŭ neniu en la lernejoj de Usono.

Ĝi konkludas, ke "la komunistaj registaroj elprovas, evoluigas kaj disvastigas unu internacian planlingvon, per internaciaj renkontiĝoj, radio-elsendoj kaj eldonaĵoj, dum Usono faras preskaŭ nenion por provi la eblecojn de tiu lingvo aŭ prezenti usonajn vidpunktojn al ĝiaj parolantoj ĉirkaŭ la mondo."

Laŭ Esperantic Studies Foundation, necesus, ke la esploro de komuna lingvo fariĝu unu el la

oficialaj programeroj de la usona politiko. Intertempe ĝi rekomendas tri urĝe aplikendajn rimedojn: (A) La Parlamenta Biblioteko korektu sian nesufiĉan kaj ne-ekvilibrantan sistemon de akirado de materialoj pri internacia lingvo; (B) La usona Kleriga Departemento rekonsideru sian sintenon al "konstruitaj internaciaj lingvoj", laŭ kiu, ŝajne, ili ne estas "modernaj fremdaj lingvoj" aŭ ne estas instruindaj; (C) La Usona Inform-Agentejo rekonsideru sian principon, laŭ kiu ĝi absolute nenion elsendas aŭ eldonas en "kiu ajn vaste uzata konstruita internacia lingvo".

La argumentojn plifortigas serio da tabeloj kaj grafikaĵoj. Ili montras, ekzemple, la procentojn de libroj kaj gazetoj, radio-elsendoj kaj junularaj renkontiĝoj en Esperanto en, respektive, Usono, "Komunistaj landoj" kaj "La ceteraj landoj".

Esperantic Studies Foundation estas kreaĵo de E. James Lieberman, Humphrey Tonkin kaj Jonathan Pool. La tuta studo estis jam represita en "Congressional Record", la organo de la usona parlamento, kaj ĝiaj pluaj efikoj estas atendataj.



R. C. Pucinski instigis ESF prepa la raporton.

MARIONETOJ KAJ MINISTERIOJ

Sub la aŭspicio de UNIMA (Union internationale de la Marionette), de la 3-a ĝis la 9-a de oktobro disvolviĝis en Zagrebo la 2-a Pupteatra Internacia Festivalo. La prezidanto de la oficiala organizaĵo de pupistoj, prof. d-ro Jan Malik, mem deklaris post la finiĝo de PIF, ke la rezulto de tiu ĉi estas "tre bona". Saman kontenton montris la reprezentantoj de Ministerio de Kulturo de Rumanujo kaj de Ministerio de Kulturo de Slovakujo.

PIF estas verŝajne — kaj bedaŭrinde — nun la unika neesperantista kultura festivalo, kies oficiala lingvo estas Esperanto. La geaktoroj estas teorie devigitaj nur lerni sian rolon en Esperanto, almenaŭ tiom, kiom koncernas la kondiĉojn starigitajn de la organizantoj. Praktike, en la plej multaj pupteatroj, kiuj partoprenas, okazas ankaŭ rapidaj lingvokursoj, kelkaj eĉ devigaj. Ĉiuj trupoj, kiuj jam la duan jaron partoprenas, entuziasmigataj post la unua festivalo pasintjare, ĉijare jam povis paroli kun alilandaj kolegoj en Esperanto, kaj ankaŭ inter la geaktoroj partoprenantaj unuafoje tian aranĝon, troviĝis multaj jam kapablaj sufiĉe flue konversacii. Tiel, sentrude, PIF estas sur la ĝusta vojo por atingi sian celon, akceli la praktikan enkondukon de la Internacia Lingvo en la pupistaj medioj. Paralele kun tio, la Festivalo ebligis sentrude diskonigi Esperanton en dekoj da lernejoj, kaj en multaj el ili nun estos malfermitaj E-kursoj.

Dum la dua PIF, ses profesiaj pupteatroj el kvin landoj prezentis siajn spektaklojn en la Internacia Lingvo. Ĉiuj prezentaĵoj (sume preskaŭ dudeko) estis tre bone vizitataj de proksimume 4 000 personoj.

Krom la prezentaĵoj okazis ankaŭ simpozio sub la titolo "Esperanto kiel scenlingvo", kaj dum la festivalo fondiĝis servo por organizado de interŝanĝoj kaj turneoj. Tiu ĉi lasta (adreso: Pupteatra internacia festivalo, Intersanga servo, Amruŝeva 5/l, Zagreb, Jugoslavio) atendas la invitojn de diverslandaj Esperanto-societoj, pupteatroj aŭ aliaj organizaĵoj, kiuj pretus helpi la prezentadon en sia urbo. Speciale ĝi turnas sin al la lernejoj, kie Esperanto estas instruata. En ĉi tiuj, pupteatra prezentado ne nur konvinkus la ĝisnunajn gelernantojn pri la praktika valoro de Esperanto, sed krome ĝi helpus varbi sentrude kaj senpene novajn gelernantojn. La 3-a PIF estas planata por oktobro 1970, denove en Zagrebo. R.I.

La Hungara Ŝtata Pupteatro el Budapeŝto estis inter ses trupoj el kvin landoj, kiuj prezentis spektaklojn en Esperanto al 4000 personoj.



Varbi kelkajn milojn da lernantoj por nova kurso ne estas tiel unika afero en la Esperanto-movado. La korespondaj kursoj de Pola Esperanto-Asocio, ekzemple, regule havas tian amplekson. Sed la atingo de Hermann Behrmann en Germanujo estas tamen unika: verki, eldoni, administri kaj reklami nov-specan kurson, preskaŭ sen kapitalo kaj preskaŭ sen helpo de aliaj — kaj sukcesi!

Tian sukceson la juna Hermann Behrmann, studento pri pedagogio en Löhne (Germanujo), eĉ en siaj sonĝoj neniam imagis! Per unu simpla sed brila ideo li sola jam trovis 3000 novajn lernantojn por la Internacia Lingvo... kaj samtempe profitas el la rezultoj por sia faka laboro!

Pedagogia eksperimento

La temo, kiun li elektis por sia ekzameno ĉe la pedagogia altlernejo de Bielefeld, estas: eksperimenta elprovado de programita instrumetodo por Esperanto. Behrmann mem ellaboris la metodon, kies baza principo (la fundamento de ĉiuj t.n. programitaj instrusistemoj) estas, ke la lernanto neniam renkontas pli ol unu nova elemento de la lingvo per unu fojo, kaj ke li neniam eklernas tian novan elementon, ĝis li jam plene enkapigis la antaŭajn stadiojn.

Unu afero estas: ellabori tian instru-programon. Tute alia afero estas: certigi, ke la programo estas



junio	julio	aŭgusto	septembro	oktobro
500	1300	1800	2300	2850
kursanoj	kursanoj	kursanoj	kursanoj	kursanoj

ESPERANTO PROGRAMITA

- Modernaj homoj parolas Esperanton -

ĝusta, t.e. ke ĝi estas fidela al siaj principoj kaj efektive prezentas al la lernanto ĉiam nur po unu nova elemento, laŭ tute gradigita progreso. Por tion certigi necesas praktika elprovado de la kurso, kaj ĝuste tion entreprenis Hermann Behrmann. Li sendis informon al la gazetaro nacilingva, per kiu li anoncis, ke por tiu pedagogia eksperimento estas bezonataj 500 kuraĝaj volontuloj, kiuj donos al si la penon trastudi la materialon kaj ĝin kritiki. Fakte, Behrmann ne estis tiel optimisma kredi, ke troviĝos 500 personoj pretaj studi Esperanton nur por la progresigo de la pedagogia sciencol. Sed li ja esperis trovi almenaŭ 50-100 tiajn volontulojn.

Interesiĝis gazetaro

La gazetaro ekinteresiĝis pri la alvoko de Behrmann. Lerte formulita, ĝi prezentis ion novan, kaj la redaktoroj volonte aperigis ĝin. Artikoloj kaj mencioj komencis aperi en la tuta germanlingva gazetaro kaj en multaj aliaj lingvoj: en Germanujo, Luksemburgo, Nederlando, Svisujo, Aŭstrujo, Belgio, eĉ Meksiko kaj Kanado. Profitante tiun interesiĝon, Behrmann lanĉis reklam-kampanjon samtempan per pagitaj anoncoj en 27 grandaj gazetoj kaj multaj lokaj.

La rezultoj superis ĉiujn esperojn: ĉiutage alvenadis 20-50 leteroj de personoj pretaj partopreni. Laste la suma nombro de partoprenantoj proksimiĝas al 3000 en 23 landoj! La granda plimulto troviĝas en Germanujo, sed en Nederlando, ekzemple, estas pli ol 100, en Belgio, Luksemburgo, Svisujo kaj Aŭstrujo po 30 aŭ pli. Jam pli ol 300 lernantoj

aparte skribis por laŭdi la instru-metodon kaj danki pro la intereso, kiun ĝi alportis al ili. Jen nur kelkaj specimenoj:

Alt kvalitaj lerniloj

Altlerneĵano skribis: "Mi estis ege surprizita, ke la programita lernado estas tiel facila." Gimnazianoj: "Ĝis nun mi estas entuziasma pri la instru-metodo" — "Vi sukcesis enkonduki la lernanton en la lingvon Esperanto po etaj paŝoj, tiel ke li eĉ ne rimarkas la lernadon." Abituriento: "Mi trovas vian metodon la plej bona por lerni lingvon. Oni lernas aŭde kompreni, legi kaj paroli!" Studentino: "La unuan kajeron mi tralaboris ne nur facile, sed lude. Mi jam senpacience atendas la duan." Fakinstruisto: "Mi opinias la specon de instruprogramo, kiun vi ellaboris, unuaranga."

La neatendite vasta reago de la publiko necesigis grandan organizan laboron en Löhne. Feliĉe, pluraj helpantoj aliĝis al Behrmann por malfermi leterojn, adresi kaj afranki. Ĉiuvespere aŭtomobilo de amiko portis plurajn skatolojn da kovertoj al la poŝto-oficejo.

La sistemo administra estas simpla. Ĉiu, kiu sin anoncas, ricevas tuj la unuan, ofsetitan kurs-kajeron, akompanan diskon, 40-paĝan inform-broŝuron "Moderne Menschen sprechen Esperanto" (Modernaj homoj parolas Esperanton), kaj apartan testfolion. Post tralaboro de la unua kajero ili rajtas elekti inter tri eblecoj: resendi la materialojn, pludoni ilin al alia interesita persono, aŭ konservi ilin kontraŭ pago de la kost-prezo (en-

tute 5,55 markoj, ĉ. 5 guldenoj). La plimulto elektas efektive la trian eblecon, tiel ke iom post iom revenas la mono investita por produkto de la broŝuroj kaj diskoj. Ĝis nun jam aperis tri el la kvar planitaj broŝuroj kaj diskoj. Al ĉiu kajero apartenas unu disko. La tekston surdiskigis krom Behrmann mem ankaŭ Helga Lindner kaj f-inoj Waltraud Reinwald (Germanujo) kaj Nika Tauĉar (Jugoslavio). La prononco estas kiel eble plej internacia, kaj la teknika kvalito tre alta.

Por pli da evoluo

Nun, kiam la potencialo de la kurso sin evidentigis tute klare, Behrmann ekspluatas ĉiujn rimedojn por plukonstrui la atingitan sukceson. Kun la tria kajero la lernantoj ricevos trikoloran afiŝon kaj nombron da samstilaj varbslipoj enmetebaj en leterojn. Tiel, espereble, ili mem kunhelpas trovi novajn kursanojn. Nova gazetara kampanjo estas lanĉita en senprecedenca skalo kun la celo atingi ĉiujn landojn de okcidenta Eŭropo: en tiuj landoj ĉiuj 1567 gazetredakcioj jam ricevis mantajpitan leteron kun la peto publikigi alvokon. En Germanujo komenciĝis nova kampanjo per aperigo de pagitaj anoncoj kun la kondiĉo, ke la gazetoj publikigu novan alvokon senpage samtempe kun la anoncoj. Esperantistoj estas alvokataj aĉeti la unuan kajeron kaj diskon (kune = 5,55 g.m. aŭ 5,— gld. aŭ 11 int. respk., + afranko) kaj vendi aŭ donaci ĝin al konato, kiu scipovas legi la germanan. (Ĝis nun aperis nur la germanlingva eldono.)

En tempospaco de nuraj 7 monatoj, Hermann Behrmann sukcesis varbi 3000 novajn lernantojn de Esperanto per tre malmultaj homfortoj kaj financaj rimedoj. Pli grave, li pruvis, ke celtaŭga kampanjo ĉe la gazetaro plus efika instrumetodo signifas grandan interesiĝon ĉe la publiko. En la nuna periodo, kiam Esperanto-organizaĵoj en pluraj landoj serioze klopodas atingi Esperanto-kursojn en televido, lia sukceso prezentas fortan argumenton kaj ege kuraĝigan precedencon.

(La adreso: Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1, Germanujo; tel. 05732-3290).

Per minimumaj privataj financaj rimedoj Behrmann lanĉis sian kvar-ŝtupan programitan kurson de Esperanto — eĉ ne sciante, ĉu li sukcesos eldoni ĉiujn kvar kajerojn kaj kvar diskojn. Sed la eflo de la unuaj du estis tiel bona, ke jam povis aperi la tria ŝtupo, kaj estas certigita ankaŭ la kvara.





Vesna Skaljer-Race estas jam konata kiel poetino en la serba lingvo, kiel ankaŭ en Esperanto, sed "Maristo surmaste" estas ŝia unua libro-forma verko en Esperanto.

Sentoriĉa kaj liberforma

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Maristo surmaste, poemaro de Vesna Skaljer-Race. Beograd: la aŭtoro, 1969. 59 p. Ilus. 17 cm.

Poemaro, originale verkita en Esperanto, vin-jetoj, neta formato. Divido en kvar partojn, karakterizeblajn jene: (1) reagoj, ĝenerale de indigno, kontraŭ krudaj realaĵoj en interhomaj rilatoj; (2) sentoj kaj pensoj ligitaj al la persona "mondo de la deziro"; (3) naturaj impresoj; (4) "metafizikaj" meditoj kaj metaforoj. La formoj de la poemoj estas ĝenerale "liberaj", rimoj kaj regulaj versoj kaj strofoj neoftaj.

Ĉu la iom kripta kriterio, ke poezio estas esploro pere de la lingvo ekster la limojn de la lingvo, aplikeblas bonrezulte al la poezio de Vesna Skaljer-Race? Parte jes. Precipe en la kvara sekcio oni konstatas sukcesajn komunikojn de tia esploro:

RIĈIGAS NIAN

Ne gravas
se post ĉiu ascendo
venas ioma glito
kaj fal'.

La klifo malglatas
pro sekiganta ŝvit'.
La ungoj spasmas
alkroĉe,
koloras ruĝe,
sale.

Dum suben ĉiam pli invitas
la profundoj,
ni grimpas
al horizontoj niaj.

Ĝenerale, tamen, la poezio en "Maristo surmaste" estas tro ligita al la vidmaniero de prozo por "elradii"; ĉi tio estas plej konstatebla en la unua parto, kie la indigno povas impresi histerie ("Linĉu, linĉu, la murdistojn linĉu!"; "Kiam la besto rampos/ kvazaŭ vermo en polvo./ piedpremu ĝin!").

Mi tamen rekomendas la libron pro ĝia simpatia sentoriĉo, ĝenerale bona lingvonivelo kaj aplaudinda sendependeco rilate al versformoj.

Mendu ĉe UEA: bind. 4,80; broŝ. 2,70 gld. + sendokostoj 10 %.

Kredo de liberpensulo

Recenzas Péter Rados (Budapest):

La infana raso, poemo en 25 ĉapitroj de William Auld. 2a eld. La Laguna: Régulo, 1968 (1969). 121 p. Ilus. 19 cm. (Beletraĵ kajeroj 36).

La poemo malfermas por ni pensaron de samtempo. La pensanta cerbo, kies produkto ĝi estas, re- kaj revenas al la plej gravaj problemoj. Tiamaniere la verko havas kelkajn "ĉeftemojn";

LASTE APERIS...

Kvar landoj respondecas pri la ĉi-monata provizo da novaĵoj sur la eldona kampo: Britujo, Ĉinujo, Argentino kaj Polujo.

Grandan signifon havis en Polujo la oficiala Instruprogramo de Esperanto eldonita de la ministerio por klerigo kaj superaj lernejoj. Nun PEA eldonis ĝian Esperantan tradukon, precipe interesan por instruistoj alilandaj, sub la titolo "Instruprogramo de Esperanto". Eble sub la stimulo de tiu sukceso, aperis pluraj novaj lerniloj: la 6a represo de la granda (357-paĝa) pola-Esperanta vortaro de Guterman; 2a eldono de la lernolibro "Esperanto" de A. Pettyn; kaj nova lernolibro pli ol 300-paĝa de la sama aŭtoro: "Ĉu vi parolas Esperante?" Tiun lastan lernilon akompanas cetere kvar longedaŭraj diskoj tute en Esperanto, sekve internacie uzeblaj.

Nova disko alvenis ankaŭ el Britujo: "Esperanto, pronunciation disc". La voĉo estas tiu de John Wells, aŭtoro de la tre sukcesa vortaro de EUP. Duflanka, monofona, 45 t/m, 18 cm. Prezo: 2,50 gld., inkluzive tekston. BEA eldonis ĉi-jare ankaŭ 26-paĝan jarlibron ("Handbook 1970"). Evidente ili timis malfruiĝi...

El Ĉinujo venis ankoraŭ tri tradukoj el verkoj de Maŭ, originale el la jaroj 1937-42. El Argentino: nur 3a eldono de "Curso total de idioma internacional Esperanto" (47 p.).

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

LITERATURON

ekzemple: la "senbreĉa vivfadeno" la celo, kiun "ni plenumas" kaj kiu "nin konsumas", la antaŭlonge pretaj iloj al la solvo de nesolvitaj problemoj, murdadoj, amo kaj erotiko, religio kaj sentolereco, la nekredebla neŝanĝiteco de la socio de post Sargono Unua ĝis niaj tagoj. Ĉiu ĉapitro alimaniere prilumas la tematajn problemojn. Tiel rezultiĝas la fama pena kompreneblo kaj "troa moderneco" de la verko.

El la supre menciitaj temoj leviĝas la plejĉefa, pri kiu parolas la titolo kaj la sekvaj versoj en la poemo: "La homo estas infano /kaprica kaj groteska: /Kiam li tion komprenos/ li iĝos adoleska."

Tiu ĉi verko estas "credo" de liberpensulo, ĝin penetras granda kaj profunda humanismo: "mi kredas pri la/ bonvolo de l'homaro,/ ke iam pasos/ kruelo kaj amaro,/ke iam venos/ la regno de l'racio;/ sed multaj larmoj/ necesos antaŭ tio."

La Infana Raso riĉas je grandaj pensoj, ĝi estas verkita majstre, ĝiaj lingvaĵoj kaj stilo estas modelaj kaj modernaj. Ĝi, jam en vastaj rondoj konate, estas eble la plej grava verko de la ĝisnuna originala literaturo en nia lingvo. La dua eldono jam delonge estis necesa. Ĝian kompreneblon multe plifaciligas la altnivelaj aŭtoraj notoj kaj la antaŭvortoj de John Francis kaj Vilmos Benczik.

Mendu ĉe UEA: 5,40 gld. + sendokostoj 10 %.

Lirike persona

Recenzas Lajos Tárkony (Budapest):

Arĉoj, sonetaro de Geraldo Mattos. La Laguna: Régulo, 1967 (1969). 141 p. 19 cm. (Beletraj kajejoj 35).

Geraldo Mattos, kiun la versamantoj tenas en senpacienca kalkulo, se ili iom longe nenion povas de li legi, nun fine elpaŝis per tuta volumo enhavanta 109 sonetojn, inter ili du kuriozajn francaĵojn verkitajn en unu el la Pra-Esperantoj studitaj de Waringhien. La poeto dividas siajn poemojn en ses ciklojn (krom la "Uverturo"). Rigardante tiujn ciklojn kiel ŝtupojn, nevole oni rememoras pri "Ŝtupoj sen nomo" de B. Ragnarsson.

La unuaj du cikloj estas lirike plej personaj, kaj mi tuj konfesas, ke kelkaj pecoj el ili kaptis min pleje en la libro, konfirmante la paradokson, ke la plej persona liriko povas esti la plej ĝenerale valida.

La dua cikloparo, poeziaj portretoj, tentas pensi pri parnasismo. Tamen ĉi tie ne troviĝas sonetfermoj marmore rigidiĝantaj en sceno aŭ bildo, sed varme homa kunsento streĉita kelkfoje preskaŭ ĝis identiĝo.

En la tria cikloparo, t.e. sur la lasta ŝtupo, la identiĝo, provata kaj praktikata mezparte, plenumiĝas ekstreme, kvazaŭ ekscese: la poeto produktas koŝmare koasan poezion pri koŝmare kaosa mondo, tiel ke en tiu "partenogena nokto de angoro" li sentas sin perdiĝi kiel "en nebulo sen nadlo". La leganto, gvidata de perdiĝinto, eble

same sentas sin perdiĝi en tiu "vespero sen okuloj", sed tiel ja devas esti.

La poeto estas majstro de versado: per neatenditaj rimvortoj li povas laŭtigi neatenditajn kordsonorojn. La libro alportis multon novan kaj interesan kaj tre scivoligas pri la plua evoluo de la poeto.

Mendu ĉe UEA: 5,40 gld. + sendokostoj 10 %.



Geraldo Mattos,
kies novan
poemlibron ĉipaĝ
recenzas
L. Tárkony

Por duon-esperantistoj

Recenzas Vilmos Benczik (Budapest):

Legolibro: De sezono al sezono (printempo kaj somero), komp. Miyamoto masao. Tokio: Yōbunsha, 1969. 89 p. 19 cm.

En la lasta tempo inter la Esperantaj novaperaĵoj ekabundis la legolibroj: ni ĝoju, ke la eldonejoj finfine rimarkis la grandan amason de duon-esperantistoj, kiuj sen la eblo de plua studado baldaŭ forgesus eĉ sian scieton, akiritan en la elementa kurso.

Post la brila "Paŝoj al plena posedo" de W. Auld, kiu libro celas Internacian legantaron, el la plumo de same kompetenta persono — Miyamoto masao — nun aperis similkaraktera legolibro por japanoj. La libro enhavas instrumaterialon por ses monatoj. Grava merito de la Auld-a kaj de ankaŭ ĉi tiu legolibro estas la strebo al sistema konigo de la literaturo kaj movada vivo. Kvankam la elekto de Miyamoto estas iom tro "gazetema", la legolibro nekontesteble multe helpas la lernanton enetosiĝi en nia kulturo.

Bedaŭrinde tiun ĉi laŭdindan — ankaŭ por ne-japanoj uzeblan — legolibron makulas kelkaj ĝenaj preseraroj.

Mendu ĉe UEA: prezo ankaraŭ ne konata.

Bibliografia Servo?

Seriozaj studentoj de la Esperanta literaturo de kelka tempo sentas la bezonon de rapidaj kaj precizaj informoj pri ĉiuj novaj eldonaĵoj: libroj, broŝuroj, diskoj, eĉ gravaj faldfolioj. Verŝajne neniu alia biblioteko kolektas tiel komplete la nuntempan Esperanto-literaturon, kiel la Biblioteko Hodler, ĉe UEA. Ĝi ankaŭ registras rapide kaj akurate ĉiujn novajn akiraĵojn en triobla sliparo: laŭ decimala klasifo, laŭ aŭtoroj kaj laŭ titoloj. Ne estus, do, malfacile efektiviĝi novan Bibliografian Servon, kiu sendus al la abonantoj de la Servo regule (ekzemple: ĉiumonate) faskon da slipoj, sur kiuj estus multobligitaj la bibliografiaj detaloj pri ĉiuj novaj akiraĵoj de la Biblioteko. Praktike, tio signifas: de la tuta Esperanta literaturo. Klubaj kaj privataj bibliotekoj povus utiligi la slipojn por indiksi sian propran kolekton. Eĉ liverado de la slipoj en laŭdezira formato ne estas malebla.

Tiu nova servo povos ekfunkcii preskaŭ tuj, se nur troviĝos malgranda, sed sufiĉa nombro da interesitoj. La abonprezo dependos de la nombro. Kiu principe volus aboni, bonvolu skribi al UEA. Per tio neniu ankoraŭ sin devigas aboni.

LOKE - FAKE - PERSONE

FAKE

Literaturo

- Statistiko pri la Universala Kongreso en Helsinko montras, ke la kongresanoj elspezis meze po 10 markoj por memoraĵoj diverspecaj, sed nur po 3 markoj por libroj. La rubriko "memoraĵoj", tamen, inkluzivas ankaŭ sondiskojn...

Paco

- La Premio Nobel por la Paco, 1969, estis aljuĝita al la Internacia Labor-Organizaĵo, kiu fariĝis 50-jara en junio. Jam la trian fojon ricevis la premion, valoran ĉ. 260 000 gld., organizaĵo el la familio de UN. UEA mem estis unu el la 35 kandidatoj.

PERSONE

Estling

- Per ceremonio tute esperantlingva — laŭsupoze la unua tia en Usono — geedziĝis en la estonta UK-urbo Portland (Oregon) nia membro Albert Estling kun LKK-anino Sara Ann Nehls, la 18an de oktobro 1969. Esperanto estis la lingvo de la nova paro ekde la konatiĝo en junio 1969.

Itoō

- Daŭrigante sian sukcesan post-kongresan prelegvojaĝon, nia delegito Eizo Itoō el Kameoka (Japanujo) atingis fine de septembro la aŭstran urbeton Knittelfeld, ĝemeliĝinta kun Kameoka. (La du lokoj nun havas respektive "Kameoka-straton" kaj "Knittelfeld-straton".) Du prelegojn kun interpretado el Esperanto en la germanan ĉeestis interalie pli ol 500 lernejoj kun siaj geinstruistoj.



LOKE

Brazilo

- Pli ol 2 000 personoj vizitis ekspozicion de infan-desegnaĵoj aranĝitan en la Universitato de Rio Grande do Sul, Porto Alegre, en oktobro 1969. La loka Esperanto-societo kolektis la desegnaĵojn el 30 landoj de ĉiuj kontinentoj. La inaŭguron partoprenis nombro da lokaj aŭtoritatoj kaj pedagogoj.

Britujo

- La Nacia Konsilo de Ciganoj fondis korespondan kurson por ciganoj, kiuj ne scipovas la ciganan lingvon. Inter la unuaj kursanoj estas la cigandevena film-aktoro Yul Brynner.

Ĉeĥoslovakujo

- En Praha kunsidis en oktobro, unuafoje post la fondo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la plena komitato de ĈEA. Interalie ĝi decidis peti aliĝon de ĈEA al UEA kaj fondi sekciojn junularan, fervojistan, katolikan kaj evangellian. Ĝis la 10a de oktobro ĈEA jam atingis 1 222 pagintajn membrojn.

Danujo

- Denove tre sukcesaj estis la aŭtunaj ferioj kun kursoj en Arhus. Partoprenantoj el sep landoj povis samtempe lerni kaj distriĝi. La ĉiujara sukceso de la danaj aranĝoj mirigas, ke ne pli multaj landoj entreprenas samstilajn kursojn internaciajn.

Finnlando

- Nur nun estas eble superrigardi la plenan efikon de la 54a Universala Kongreso ĉe la publiko en Finnlando. Statistiko montras, ke en la antaŭkongresa periodo aperis specialaj artikoloj pri Esperanto kaj la UK en multaj gravaj gazetoj, kun suma amplekso de 11 590 mm. En la kongresa semajno aperis entute 21 605 mm da specialaj artikoloj. Tiuj ciferoj ne inkluzivas malgrandajn informojn en plej diversaj gazetoj, nek ĉion, kio ankoraŭ aperis post la UK. Krome okazis prezentoj de pluraj intervjuoj kaj filmoj en radio kaj televido.

Libio

- La nova reĝimo indikis kiel unu el siaj celoj: redukti la lernadon de fremdaj lingvoj, ĉar "ni ne plu estas itala kolonio nek angla protektorato". Sekve en magazenaj stratoj ktp. rajtas aperi nur arabskribaj indikoj kaj malaperis fremdlingvaj anoncoj.

Polujo

- Pli ol 300 personoj el 13 landoj partoprenis la 5an Internacian Libertempadon Esperantistan en kuraĉloko Miedzygórze, en septembro. Funkciis amatora radiostacio; muzikis junulara grupo "Muzylo" el Vroclavo.

Rumanujo

- Esperiga paŝo estas la ĵusa enkonduko de Esperanto ĉe la Popola Universitato de Braŝov, la due plej granda urbo de la lando, kiel egalranga kun aliaj lingvoj instruataj. Krome daŭras du kursoj en la Instituto de Politekniko en Bukareŝto.

ITALUJO: Impona etoso regis en la 40-a Itala Esperanto-Kongreso en Como (13-18 septembro). Sur la foto: la prezidanto de LKK, inĝ. Azzi, inaŭguras la Kongreson en ĉeesto de IEF-prez. Stoppoloni, urbestro Gelpi (ambaŭ maldekstre), prof. Lapenna (dekstre) kaj alilandaj salutontoj.



55-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1—8 aŭgusto 1970

Alta protektanto: Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Ĉarma ferioestadejo

La 11a Internacia Infana Kongreseto, okazonta paralele kun la 55a UK en Vieno, akceptos la esperantlingvajn infanojn en ĉarma internacia kulturejo "Hörndlwald" (A-1130 Wien), kie ili disponos pri 20 ĉambretoj por 40 infanoj. Oni havos apartan domon, sed samtempe loĝos en aliaj domoj libertempantaj infanoj. Tiel la infanoj estos inter si, sed ankaŭ en la publiko. En la apudaj parkoj troviĝas grandaj ludejoj, inkluzive infanan naĝbanejon. Pro la limigita nombro de akceptotaj infanoj frua aliĝo estas konsilinda.

Filmprezentadoj dum la 55-a UK

Plenumante la deziron de multaj kongresanoj, la kongresorganizantoj enprogramigos kelkajn filmprezentadojn al la kongresa programo. Kunlige al tio, ili petas ĉiujn Esperanto-instancojn, kluĝ posedas prezentindan filmon kun esperantlingva teksto aŭ je konvena temo, aŭ scias pri tiu, komuniki kaj proponi tion al la LKK. Samtempe oni klopodu iniciati ĉe koncernaj (turismaj, naturamikaj, komercaj ktp.) entreprenoj eldonon de novaj filmoj en la Internacia Lingvo. (Noto: evitendaj estas filmoj ne neŭtralaj.)

Internacia Film-Konkurso

La Estraro de UEA kaj la 55a UK anoncas internacian konkurson por filmamatoroj pri dokumenta filmo pri la 55-a UK en Vieno 1970. Formato 8 mm, daŭro maks. 30 min., laŭvole kolora aŭ nigra-blanka. Premioj ĝis 300,— gld plus filmmaterialo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

ILERA fondota ?

Kvankam la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA) ankoraŭ ne estas oficiale fondita, diversaj ILERA-sekcioj sukcese agadas. La iniciatinto de ILERA, s-ro Rudolf Bartosch, kaj la aŭstra ILERA-sekcio kore invitas al fonda kunveno, kiu okazos dum la 55-a UK en Vieno. Celoj de ILERA estas i.a. starigi regulan Kongresan Stacion dum la UK-oj. En Vieno funkcios la Kongresa Stacio, muntota de s-ro Bugner OE 1 BKW. Radio-amatoroj skribu al s-ro R. Bartosch OE 3 RU, A-3812-Gross Siegharts.

Geografia malordo?

Skribas A. W. Thomson (Britujo):

Kun sento de miro — eĉ de maltrankvilo — mi legas en la oktobra numero de "Esperanto" (p. 165), ke iu ĉefia eldonejo intencas en 1970 aperigi verkon titolitan "Poŝ-atlaso de la mondo". Oni anoncas, ke ĝi enhavos, krom 41 mapojn, 10 000 urbonomojn, sed ne mencias, ĉu tiu vasta nomaro konformiĝos al iu nacia lingvo, aŭ ĉu ĝi estos tute aŭ parte esperantigita.

Tia verko, private komplilata kaj neoficiale eldonita, sen aprobo de la Akademio, neniel riparus la ĝisnunan ĥaoson de geografiaj nomoj kaj povus erarigi kaj konfuzi tutan generacion da verkistoj kaj redaktoroj. Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, starigita dum la varsovia Kongreso en 1959, jam prilaboradis dum dek jaroj tiun dornan problemon de loknomoj. En januaro 1968 ĝi publikigis siajn unuajn rekomendojn en la formo de provizora Mondmapo, pri kiu ĝi invitas kritikojn kaj komentojn antaŭ ol finprepari ĝin por prezento al la Akademio. La sistema elekto de taŭgaj loknomoj estas treege malfacila; multaj el ili postulas zorgan konsideradon kaj konsultadon kun diversnaciaj kompetentuloj, se ni volas forigi la ĝisnunan malordon.

Ankaŭ Salzburg prezentas imponajn perspektivojn . . .



INFORMEJO

Vi demandas — ni respondas

ĈU la insigno UEA-stelo estas portata nur de oficuloj de UEA (ekz. delegitoj), aŭ tio estas permesata ankaŭ al ordinaj membroj?

— Ĉiu membro rajtas porti ĝin (kaj efektive ni ne povus malhelpi, ke eĉ nemembroj portu ĝin!).

ĈU estas konataj al UEA la nombro kaj laŭlanda listo de stratoj kaj placoj nomitaj laŭ Zamenhof kaj Esperanto tra la mondo?

— Laŭeble kompletaj listoj aperis en 1956, 1964 kaj 1966 kiel dokumentoj de CED en la serio A/V. Tiuj dokumentoj estas nun elĉerpitaj, sed estas konsulteblaj ĉe ĉiu landa Esperanto-asocio. La listo estas daŭre kompletigata por nova eldono.

TEJO - PAĜO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondeas: Wim Jansen,
Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen,
Nederlando.**

ESPERANTO EN MEZORIENTO

Ĉi-monate ni fokusas la regionan agadon de TEJO

Eble la plej nova, kaj certe unu el la plej interesaj agadoj de TEJO, estas la tiel nomata "Regiona Agado". La "Interna Ideo" en ĉi tiu kampo estas: "evoluo de Esperanto samnivele en ĉiuj mondo-partoj estas grava postulo por ĝia tutmondeco". Birdokula rigardo al la landoj de Pakistano ĝis Suezio montras al ni en ĉiuj tiuj landoj nur malmultajn izolulojn (la Libana Esperanto-Asocio estas pli ĝuste malgrandeta grupo ol vere funkcia Asocio). Escepto estas Israelo, kies Ligon naskis ĝenerale hebreaj esperantistoj almiĝintaj el Eŭropo. Bedaŭrinde pro la politikaj cirkonstancoj la forto de la israela organizaĵo ne povas helpi en la disvastigo de Esperanto en najbaraj landoj, kaj aliflanke la israelaj esperantistoj mem estas iusence izolitaj, ĉar multekosta estas la vojaĝo al eŭropaj Esperanto-aranĝoj (ĉi tio ĉefe estas grava por gejunuloj, kies poŝoj estas sammalplenaj en la tuta mondo).

En la aliaj landoj de la regiono la izoleco, la manko de kunligiteco, okazigis ĝis nun abundan perdon de tempo kaj de energioj en la poresperanta laboro. Jen okazinta ekzemplo: iu komencas verki vortaron araban-Esperantan, poste li rezignas pri la afero, ĉar li ekscias pere de korespondanto, ke oni faras la samon en Libano. Post du jaroj aperas vortaro, sed en Egiptujo, kaj temas pri alia afero: vortaro Esperanta-araba.

Komence de sia agado la Mezorianta Komisiono kontaktis ĉiujn konatajn esperantistojn en Mezoriento esplorante la eblecojn pri kunordigo de agado. La reagoj estis sufiĉaj laŭ la esperantistaj kutimoj, sed oni estus povinta atendi pli da kunlaboremo. Sekve de ĉi tiuj unuaj kontaktoj estis nomitaj komisionanoj (iusence reprezentantoj de TEJO) en Israelo kaj Turkujo. Per pliaj instigoj la Komisiono klopodas nomi komisionanojn en la aliaj mezoriantaj landoj. La unuaj fruktoj de la agado, kiu en Mezoriento komenciĝis nur antaŭ malpli ol unu jaro, jam maturiĝas. En Israelo reprezentantoj de la junularo jam kunvenis por preparoli la eblecojn de organizita agado, praktike por fondi LS-on de TEJO, kaj oni pristudas eblajn vojojn por kontaktigi la israelajn junajn esperantistojn kun esperantistoj el landoj ne tre malproksimaj, ekzemple Turkujo aŭ Grekujo.

En Turkujo iom da aktiveco estis dum la pasintaj monatoj en Istanbul, kie la loka komisionano gvidis kurson kun la celo fondi lokan grupon, kiu

estu kerno de la estonta turka movado. Fine ekde antaŭ unu monato la mezoriantaj junaj esperantistoj (kaj ankaŭ la maljunaj, se ili tion deziras) disponas pri interligilo per la helpo de kelkaj eŭropaj LS-oj. Fakte ekde la oktobra numero "Koncize", komuna bulteno de kelkaj eŭropaj LS-oj, dediĉas du paĝojn al "mezoriantaj" informoj.

La lastaj informoj el Mezoriento, kiuj atingas min dum la skribado de ĉi tiu artikolo, montras ankoraŭfoje, ke ĉiuj facetoj de la multifaceta agado de TEJO integriĝas. Fakte la NEJO-Komisiono de TEJO intencas aranĝi venontjare instruadon de Esperanto en turkaj kaj libanaj labortendaroj. Tio ĉi certe havos efikajn postsekvojn por la mezorianta movado. Kiu juna esperantisto volas pasigi siajn feriojn en la landoj de "mil kaj unu" noktoj kaj tie instrui, dumtage kompreneble, la Internacian Lingvon? Li kontaktu TEJO-n.

Permesu fine, ke mi aldonu lastan aferon. En mezoriantaj landoj, kiel en ĉiuj aliaj landoj sen organizita Esperanto-movado, TEJO Interesiĝas ne nur pri la tiea junulara movado sed pri la evoluigo de la Internacia Lingvo ĝenerale. Ĝi do estas en tiuj landoj je dispono ne nur de gejunuloj sed de ĉiuj esperantistoj, kiuj serioze Interesiĝas pri la fortikigo de nia movado.

Renato Corsetti (Italujo)

tutmonde atendatan informon ...

TEJO KONGRESOS EN GRAZ (AŬSTRUJO) EN 1970

La 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en 1970 en Grez, ĉefurbo de la aŭstra liglando Stirio. Tiel decidis la estraro de TEJO, traktinte la inviton de Aŭstria Esperanto-Junularo kaj de la loka esperantistaro. Graz estas malnova universitata urbo, en kiun eĉ poetoj enamiĝis, kaj pri kiu oni diras, ke, restinte juna kaj bela malgraŭ alta aĝo, ĝi similas al aminda virino.

La kongreso de TEJO okazos de la 8a ĝis 15a de aŭgusto, tuj post la Universala Kongreso en Vieno. La kongresa programo enhavos krom tradiciaj eroj plurajn novaĵojn, kiuj estas specifaj al junularkongresoj. Oni loĝos en studenta hejmo, luksa konstruaĵo, kiu samtempe estas kongresejo.

Adreso de la LKK: Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrujo.

... sekvas novaĵo de intereso regiona

EN ANTVERPENO EKAKTIVIS E.J.A.

Unu el la lastaj mirakloj el la Esperanto-movado estas, ke la 62-jara Esperanto-grupo de Antverpeno (Belgujo) anoncis la naskiĝon de ido sia, nome EJA, Esperanto-Junularo Antverpena. La nov-naskito, baptita la 14an de septembro, ne atendis plenaĝiĝon por komenci sian agadon. Dum la unuaj du tagoj de novembro ĝi aranĝis semajnfinojn, kiu altiris gejunulojn el Belgujo, Nederlando kaj Germanujo. Varia programo kun prelego, kvizo, debato kaj vizito de la urbo plenplenigis la semajnfinojn. La tuto estis bone organizita kaj meritas baldaŭan ripeton.

En „Esperanto” antaŭ 50 jaroj

— n-ro decembra 1919

“Kun granda plimulto estas akceptitaj la proponoj de la Komitato de UEA pri plialtigo de la kotizaĵoj, kiun necesigis la ĝenerala plikariĝo de la vivo.” Similan frazon ni jam legis antaŭ nelonge. Ŝajnas, ke kun la tempopaso la vivo plivaloriĝas, ol iam antaŭe.



“La projekto de la nova statuto estas nun preparata kaj komence de 1920 estos sendata al ĉiuj Delegitoj por privoĉdonado.”



“La homperdoj kaj la militkostoj pro la ĵusa milito estas taksataj, respektive, je 29 milionoj da homoj, el kiuj 15 milionoj da mortintoj, kaj je 1014 miliardoj da frankoj, t.e. sesoble pli multe ol ĉiuj militoj de la komenco de la 19a jarcento ĝis 1914.”

NEKROLOGO

GASSY MARIN (1883-1969)

Mortis la dudek-sepan de septembro 1969 s-ro G. Marin, ploniro, kiu lernis Esperanton jam en 1899. Li estis malnova membro de UEA kaj loĝis en Britujo.

Esperanto en Radio


SVISA RADIO. La tagmeza elsendo nun okazas de 12.20 ĝis 12.30 per ondoj 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), lunde kaj merkrede; la vespera elsendo okazas de 21.50 ĝis 22.00 per ondoj 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs), ĵaude kaj sabate. La ondoj 13.94 m, 16.86 m, 25.25 m, 31.27 m estas direktataj al Afriko.

SVEDA RADIO ĉesigis esperantlingvajn programojn en la jaro 1952. Nun programoj al eksterlando estas dissendataj nur en ses naclaj lingvoj. Okaze de la konstruado kaj baldaŭa funkciado de tri novaj, longdistance aŭdeblaj stacioj, sveda agadgrupo forte kaj taŭge influas la administracion por uzo de Esperanto. Sukceso estas ebla, se sufiĉe granda nombro da personoj montras sian intereson pri la afero. Skribu al “Radio de Svedujo, Stockholm”, proponu, sugestu kaj petu, ke la radio-redakcio prezentu programojn pri temoj, kiujn vi preferas: kulturo, socialaj aferoj, politiko, sporto, literaturo, teatro, filmo, religia vivo, muziko, ktp. Ĉiu tetero havos utilon kaj la tuto bonan efikon.


Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la julian eldonon.

Oficiala informilo

N-ro 429, 1 novembro 1969



A. Doneis,
◀ Ĉefdelegito
en Usono



J. Toczyski,
Ĉefdelegito ▶
en Pollando

ĈEFDELEGITAJ ŜANĜOJ

Germanujo: Ĉef-delegito Reinhard Haupenthal transloĝiĝis. La nova adreso estas: D-6602 Dudweiler, Kantstr. 50. Nova konto: Kreissparkasse Dudweiler-Süd, Nr. 266-57487.

Italujo: Post multjara servado al la Asocio kiel Ĉef-delegito por Italujo, la oficon demetis pro motivoj de sano s-ro Luigi Minnaja. Pro ĉio farita por UEA ni ĉi tie esprimas al s-ro Minnaja niajn plej varmajn dankojn. Nova Ĉef-delegito estas anoncota.

Polujo: Pola Esperanto-Asocio, interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA, nomis kiel novan Ĉef-delegiton por Polujo (pro la forpaso de s-ro R. Sakowicz) la antaŭan estraranon de UEA s-ran Józef Toczyski, p. 57, Gdansk 1.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de februaro neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Britujo: E. Robert Penny, Malvern; John Gobourne, Wolverhampton. **Finnlando:** Heikki Alikoski, Turku. **Francujo:** Fernand Micoud, Saint Cyr sur le Rhône/Vienne. **Hispanujo:** Vicente Pedro Signes, Benidorm. **Japanujo:** Schmid Joŝiko, Hasuda; Nagaoka ĵiro, Sagae. **Nederlando:** Leonard de Lang-Evertsen, Venray. **Nov-Zelando:** Morris Mennell, Devonport. **Svislando:** Max Abegg, Opfikon. **Usono:** Doris Vallon, San Mateo.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Aŭstralio: Brisbane (VD). **Britujo:** Bishop Auckland (FD); Havering (D). **Finnlando:** Helsinki 53 (VD); Kuopio (JD). **Italujo:** ĈD; Palermo (D); Roma (FD Edukado), (FD Medicino). **Jugoslavio:** Beograd (FD Filatelio/Medicino); Lapovo Varoŝ. **Nederlando:** Emmeloord; Sliedrecht. **U.A.R.:** Maimoun. **Usono:** Cupertino; San José.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Harlow, s-ro Donald, Naphill, Bucks., Britujo. Heusser, s-ino Hazel H., Portland, Oregon, Usono. Mee, s-ro L., Motherwell, Lanarkshire, Britujo. Reisaeter, s-ro Trygve, Odda, Norvegujo. Serrat Arias, s-ro A., Sabadell, Hispanujo. Sona, s-ro Eckehard, Neustadt, Germanujo. Vallon, s-ino Doris, San Mateo, Calif., Usono.

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Amosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh. daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Kolektantoj! Petu informojn de la Esperantista Kolektanta Centra Informejo kaj senpagajn specimenon kaj anonceton de la fondinto: R. Melo, 15 rue Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

Vi ricevos 20 specialajn pk por viaj raportoj kaj proponoj al radio-stacioj en la mondo kaj samtempe nian "Bultenon" kun praktikaj konsiloj, informoj pri Esperanto en radio ktp. Prezo: 1 US dol. (3,60 gld, 5,20 s.kr., 8 rpk, neuzitaj PM-serioj por netranspagipovaj s-anoj). Vi aŭtomate membriĝas en "Inter — Societo por la Internacia Lingvo en Radio". Skribu al "Inter — Agadgrupo por Esperanto", Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedujo. Pĉk 42 66 60.

Ĉu Svedujo interesas vin? Se jes, skribu tuj al Radio de Svedujo, Progr. por eksterlando, S-105 10 Stockholm. Proponu programojn en Esperanto pri temoj, kiujn vi mem ŝatas. Instigu geamikojn skribi por rapide atingi konstantan programon en la Internacia Lingvo. Menciu volonte, ke petis vin skribi "Inter — Agadgrupo por Esperanto" en Gotenburgo.

S-ino Valmai Robinson, 16 Chartwell Street, Aspley, Brisbane, Aŭstralio, 39-jara, deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj.

Bonega angla gastdomo en sudorienta marborda urbo estas "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Britujo. Venu kaj lernu ankaŭ la anglan lingvon!

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun Esperantistoj el la tuta mondo s-ro M.J.E. Kat, Boliviadreef 88, Utrecht, Nederlando.

Se la frosto vintra ĝenas vin, venu al Benidorm, kie ĉiam estas printempo. Bonega vintra klimato por ripozantoj, malfortuloj, bronkituloj, astmuloj, reŭmatismuloj, frostsentemuloj, k.c. Bonaj hoteloj kaj klinikoj. Samideanoj kaj neesperantistoj (oni havas interpretistojn) petu informojn de d-ro V. Pedro Signes, Klinikio Virgen de Fátima, Benidorm, Hispanujo.

ANONCETOJ



◀ Pavla Janoušová

20-jara violonistino volas korespondi kun gemuzikistoj aŭ ŝatantoj de serioza muziko el ĉiu lando. Pavla Janoušová, Gebauerová 17, Ostrava-1, Ĉeĥoslovakio.

Unesteno — per tiu serĉas korespondantojn (pri ĉiuj temoj, sed ankaŭ pri nura poŝtmark-interŝango havas intereson) Tóth József, Várpalota, Madách t. 111, 4, Hungarujo.

"Enciklopedio de Esperanto", "Plena gramatiko de Esperanto", "Ĉu li?", "Kastelo de Prelongo", "Paŭlo Debenham", "For la batalilojn!", jarkolektoj de diversaj gazetoj kaj aliaj raraĵoj estas haveblaj pere de s-ro Roger Iserentant, Kerklaan 61, Brugge, Belgujo.

Mensaanoj ŝatantaj korespondi trans limoj de lingvoj kaj landoj skribu al M-ano Sheard, 3078 Livingston Road, Cleveland, Ohio 44120, Usono.

Mi volas korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kun esperantistoj el la tuta mondo. Ivan Šiškov, Bul. "Stoletov" 295, Gabrovo, Bulgarujo.

Ĉu ekzistas en via lando: aŭ asocio por suferantoj de la neinfekta haŭt-malsano psoriaz, aŭ io medikamente interesa rilate al psoriaz? Respondu al: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, NN1 5AT, Britujo. Dankon!

Bumerangoj faritaj de kripluloj. Ĉiu garantiata reveni. Kun ĵetinstrukcio. Unu \$ 2, du \$ 3,50. Rockhampton Esperanto-Societo, 34 Hadgraft Street, Rockhampton-North, Queensland, Aŭstralio 4701.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Oficiala informilo

(daŭrligo de p. 191)

MEMBRO-SUBTENANTO 1969

272 Azevedo, s-ro Mauro G., Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

1 Epstein, s-ro F.; 2 Fritsch, d-ro E.; 3 Gründler, s-ro M.; 4 Hoppe, pastro R., Germanujo. 5 Lewis, s-ro H. J., Kanado. 6 Wensing, s-ro E. L. M., Nederlando. 7 Perray, s-ro M., Tajlando. 8 Culbert, d-ro S., Usono.

DONACIOJ (Gld.)

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Britujo: Lapenna, prof. I., 150,—. Jugoslavio: Golob, s-ro L., 30,—.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Germanujo: Kruse, s-ino E., 8,55.

Ĝenerala kaso: Hungarujo: "onklo L.", 30,—.

Patrono A de TEJO: Britujo: Lapenna, prof. I., Francujo: Guillaume, s-ro J., Kanado: Lewis, s-ro H. J.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro illa granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Ni varbas abonantojn de 1970 por

Monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Abonprezoj:

por 1 jaro : 5.00 gld.

por 2 jaroj: 7.50 gld.

por 3 jaroj: 10.00 gld.

Eldonas: Ĉina Esperanto-Ligo

Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

Bonvolu aboni ĉe niaj perantoj en via lando, aŭ rekte ĉe ni,
Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino,
Ĉinio.

FRANCAJ ELDONAĴOJ

Ni rekomendas la legadon de:

"Tio, kion mi kredas" de la fama sciencisto Jean Rostand, traduko de d-ro Pierre Berlot. Prezo: 2,25 gld.

"ABC d' Espéranto pour ceux qui aiment les lettres" de prof. Gaston WARINGHIEN, Prezidanto de la Akademio. Prezo: 2,75 gld.

esperanto

Unike uzebla varbilo el plasto. Ĝiaj detaloj: 24 x 5 cm, verdaj minuskloj sur blanka fono. La afiŝo estas surgluebla sur ĉiun ebenan surfacon. Sur aŭtomobiloj, fenestroj ktp. ĝi longe varbas por Esperanto. Prezo de 3 ekz.: 5,— GM. Mendu ĉe: Peter Weide, 2 Hamburg 61, Nordalbingerweg 65.

DELEGITOJ !

Se vi transloĝiĝos al alia urbo, via delegiteco aŭtomate ĉesos.

Se vi tamen deziras delegitiĝi en la nova loĝloko, petu novan delegit-respondilon de via Landa Asocio (se ĝi aliĝis al UEA) aŭ de la Ĉef-delegito aŭ peranto (se tia persono ekzistas en via lando) aŭ (se ekzistas nek Landa Asocio nek Ĉef-delegito aŭ peranto) rekte de la Centra Oficejo de UEA.

Helpu nian administradon! Antaŭdankon!

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAĴO

por ebligi la **eldonon de komuna traduko** en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

VIZITU SENPAGE POLLANDON!

Kiamaniere?

Partoprenante la novan konkurson de la Pola Radio por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Ĉar la ĉefaj premioj estas: — valoraj objektaj premioj,
kaj krome: — 10- aŭ 12-tagaj senpagaj vizitoj en Pollando,
— multaj memordonacoj.

Por partopreni alsendu trafan respondon almenaŭ je unu el la demandoj:

1. Kiu en kiu tago komencis la duan mondmiliton?
2. Ĉu en via lando troviĝas lokoj memorindaj pro batalo de poloj "por via kaj nia libereco" /bonvolu menciil la nomojn de la lokoj/?
3. Kiuj — konataj al vi — polaj poŝtmarkoj memorigas eventojn de la dua mondmilito?

Respondojn sendu ĝis la 15-a de decembro 1969 j. /decidas poŝta stampo/ al: POLA RADIO, WARSZAWA 1, P.O. Box 46 en kovertoj kun la signalvorto "Konkurso".

La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj la 15-an kaj la 16-an de januaro 1970 en niaj elsendoj.

Ni deziras al vi bonŝancon!

POLA RADIO

